

MIHÁLY BABITS

1883— (Pron: miháj babiĉ).

Krom la ĉiam maltrankvila, interne bolanta penso, la ĉefelemento de lia poezio estas tiu senobjekta, nekuracebla doloro, kiu akompanas tra la vivo tiun, kiu per granda, pli ol normala sentemo kaj malmulta ag-energio staras kontraŭ la vivo. Multflanka, profundtema romanverkisto. Inter liaj noveloj kaj fabeloj troviĝas ĉefverkoj. La Mitologio estas gemo de l' hungara lirika novelo. Liaj eseoj atingas la supron de l' tiaspeca eŭropa literaturo. Genia tradukanto (la plena Dante, la Tempesto de Shakespeare, Edipo de Sophokles, poemoj de Baudelaire, Poe, Wilde kaj aliaj anglaj, francaj, germanaj, grekaj poetoj.) Formvirtuozo, sed pli ol virtuozo!

CIGANKANTO.

Vento veas, branĉo krakas,
ciganino voje vagas,
haroj el sub ruĝa tuk'
grase pendas ĝis la nuk'.
Ŝi sur tolo ligis maŝon,
tiel portas la havaĵon,
pendas maŝoj de la tolo,
du ĉel' koksoj, du ĉel' kolo.
Bubo, eta surdorsul',
dolĉe dormu en dorslul',
venas kampoj, boskoj, rokoj,
bonaj lokoj, misaj lokoj,
bela land',
verda land',
zuma branĉo, venta kant'.

Morusujo voje staras,
eta bubo plore knaras,
trista arb' de suno sekas,
ciganino jam lacegas,
branĉe ligas pendan liton,
lulas sian novnaskiton.
Liton tenas bona arb',
fruktopenas dona arb'.
Seka branĉo fajron donas,
branĉoj ĉie ja burĝonas,
kaj se l' fajro estas preta,
ja troviĝas poto eta,
eta pot',
granda pot',
ĉie nur ĉiel-dorlot'.

<p>Branĉe ligas ŝi pendliton, lulas sian novnaskiton: Bubo, eta surbranĉul', dolĉe dormu en branĉlul'. Venas kampoj, boskoj, rokoj, bonaj lokoj, misaj lokoj, por vi: bonaj lokoj nur: ĉie brilas ja lazur'. Ne forgesu: branĉ' vin donis, vi sub morusuj' burĝonis, kiel semo de l' branĉfino, vi ŝiriĝos de l' patrino, nek hejmsin', nek vojfin', kaj nek patro, nek patrin'.</p>	<p>Ŝi fabelas pri fantom', kantas al la eta hom': Surbranĉul', anim' burĝona, via vivo kiel bona! Se l' malbela vento ĝemas, eta bubo ete tremas, donas fajron seka branĉ' ĝis printempvetera ŝanĝ'. Se tro ardas la sunbrilo, por la mastro: malutilo, por vi estas bagatel': ĉie ŝirmas branĉombrel'. Majskarab', majskarab', por la mastro: plaga frap'.</p>
--	---

Venas kampoj, boskoj, rokoj,
bonaj lokoj, misaj lokoj,
por vi bonaj lokoj nur:
ĉie brilas ja lazur'.
Se arbare judo vagas,
sen rigard' vi lin atakas,
se knabin' en kampo venas,
sen demand' vi ĉirkaŭprenas.
Ja ne vane branĉ' vin donis,
vi sub morusuj' burĝonis,
kiel semo de l' branĉfino,
vi ŝiriĝos de l' patrino,
nek hejmsin',
nek vojfin'
kaj nek patro, nek patrin'.«

LA DANAIDINOJ.

Sube, en submond' silenta, mond' malĝoja kaj senventa, inter asfodeloj, kie asfodel' eĉ ne moviĝas, funebrarb' ne branĉbalancas, nek petal' papava falas, ĉar la vento tie dorinas, kuŝas liron asfodelan, svene kuŝas en silent',

kie lagoj ŝtalspegule kaj senmove sin elsternas, sin palpebroj baldaŭ fermas, ĉar palpebrojn ventumante, ŝaŭmkrispige, vekzumante ne iradas tie vent',

en amforojn vaste vastajn, en amforojn alabastrajn kvindek ombroj, kulpaj ombroj, sveltan vazon enmergante, jen mergante, jen verŝante, kvindek damnaj virinombroj por eterne verŝas plu, kvindek damnaj ombroj palaj verŝas, verŝas al fatalaj alabastraj vazoj vastaj vane sian karan sukcon, la neniam sufiĉantan sukcon el la Lethe-flu'.

Funebrarboj sveltgigante staras, branĉon ne skuante: [ĉiu arb': anim' malnova, memmortiga, nun, senpova, sur senmova muta arbo, vegetadas kun sopir',

sente, tamen senkonscie, streĉas branĉon apatie kaj senmove sub noktstampo, tra la kampo

tra la kampo, kie Lethe (ĉar ĉi kampon lavas Lethe) de mil kulpoj enlavitaj malpurakve, de prakulpoj forgesitaj malpurakve ne pereas en rondir',

ne pereas, mar-atingas, sed sepoble ronde ringas, en sin mem. reflue: tie kvindek ombroj letargie, en amforojn alabastrajn verŝas la neniam lastajn akvojn, larmojn vane plu,

jen mergante, jen verŝante, vane, ĉar la kvindek fataj vazoj ne farigigas sataj, per si, kiel mar', la akvo sin retiras kaj malŝvelas, kaj la kvindek kulpaj ombroj en la vastajn, alabastrajn vazojn por eterne vane verŝas el la Lethe-flu'.

Kvindek ombroj: blankmarmoraj korpoj, haroj korvkoloraj, sente, tamen senkonscie, verŝadante letargie, kantas kanton sen kompren',

kvindek damnaj ombroj palaj, rememorojn kor-vizitajn, el la supra, suna mondo subportitajn, subkonsciajn sufokvoĉe kantas, jen:

»Ni mortigis niajn edzojn, kvindek grandajn bravajn virojn, kaj ni amis, amis vante, kiun? eĉ mem ne sciante, sopirkruĉon plenmergante, jen mergante, jen verŝante, supre, sur verdluma tero, supre, sub la ora sun' —

Vortoj foraj revenadas al animoj niaj noktaj, kiel en mallum' en ĉambron jetiĝantaj stratolumoj; kion ili signas? Vane ni klopodas rememori; kion do signifas: ami? kaj: sopiri? kaj: brakumi? en mallumo ni la ombrojn vane demandadas nun.

Do ni kantu: *Ni mortigis* — ni memoru: *niajn edzojn* — kantu ni eĉ sen kompreno, jen mergante, jen verŝante; ja ne povas

ni ĉesigi; kantu ni eĉ sen kompreno, ĉar ja male estas mutoj,
kaj ĉi mutoj tiel premas! muta, murda mallumego, mallumego
kaj silent' —»

Jene kantis kvindek ombroj, kvindek damnaj virinombroj, inter
si tiel similaj fratinoj: blankmarmoraj korpoj, haroj
korvkoloraj, kantis sur la kamp' de Lethe, ĉe amforoj,
papavfloroj, animarboj, heleboroj, apud Lethe, kie vent',
sube, en submond' silenta, mond' malĝoja kaj senventa, kuŝas
litojn asfodelan, svene kuŝas en silent'.

DU FRATINOJ.

Anim! du fratinoj vin gvidas kaj sekvas eterne sur vojo,
Ĵ unu: la nigra Malĝojo, dua: la sanga Sopir'.

Kaj ploras kelkfoje Sopiro: mi estas Malĝojo,
kaj ridas kelkfoje Malĝojo: mi estas Sopir'.

Du seriozaj, stature, vizaĝe similaj orfinoj
rigarde vin pelas, trankvilon ne lasas dum ir',
filinoj de Ĵ Amo mortinta, kolombokoloraj korvinoj,
regalas per vin' la Malĝojo, regalas per sang' la Sopir'.

Filinoj de Ĵ Amo malhela, iamaj nuptofraŭlinoj kun krona ornamo
vin gvidis kandle al ĉambro de lito kovrita per nupta tŝapiro,
patrimortigantoj poste, murdintoj kaj ankaŭ promortaj venĝantoj
de Ĵ Amo:

milsopira Malĝojo, milmalĝoja Sopir'.

Kaj ili sin amas, neniam disiĝas, sin plekte kunĉenas,
kaj havas Malĝojo lipojn mildmolajn, kaj dentojn Sopiro por ŝir',
fratine sin amas, fratinan dividon el sang' via prenas,
kaj kisas Malĝojo kaj mordas Sopir'.

Florkronon el nigra helebor' ili havas kaj ombrojn gigantajn
balancas lanterne sur vojo
kaj sekvas senĉese vin nigra Malĝojo kaj gvidas vin sanga Sopir',
kaj ploras kelkfoje Sopiro: mi estas Malĝojo,
kaj ridas kelkfoje Malĝojo: mi estas Sopir'.

NAIVA BALADO.

en kiu la poeto rakontas, ke li foje vidis grandajn knabinarojn
kiuj povis murdi animojn per lilioj, kaj, ke li timis ilin, kaj
ke li petis ilin, ke ili indulgu lian animon, ĉar la animo de l'
poeto estas trezoro de ĉi mondo.

Mi vidis grandajn knabinarojn,
knabinajn arojn kun lilio,
dum la anim' en konvulsio
luktis kun suproj el glacio,
kaj kun venena florfolio
de murdnarkota flor', lilio,
mi vidis veni knabinarojn
kaj diris: »Knabinoj, mi estas
almoza vagabond',
sed se mi mortos, tamen
malriĉos ja ĉi mond'.«

Ili ridis, kaj mi diris nun:
»Mi estis reĝo, ŝipogvide
genupremante ondojn ride,
kiel virbovon Mithras side,
ŝipjugon mi surĵetis bride,
mi estis reĝo, ŝipogvide.«

Ili ridis, kaj mi diris nun:
»Kaj eble ne estis mi reĝo,
nur bubo, subŝipan',
sed se mi mortos, tamen
dronos ocean'.«

»Alpremis ame ĉion novan,
ĉion malnovan miaj brakoj,
mi naĝis tra riverzigzagoj,
dancis sub ebriaj ŝipflagoj,
putris mute sur mukaj lagoj,
ĉion malnovan miaj brakoj
alpremis ame, ĉion novan,
anim' mia: trista muziko,
ĝian ritmon vivis mi,
kaj se mi mortos, unu
okulon fermos Di'.«

VINTRA KANTO.

en kiu la poeto komparas sin kaj siajn kunulojn al ministoj.

Jen neĝas nun, ekflugas nun la kant',
 jen neĝas nun,
 korbata forno kun mallaŭta zum':
 la kant' nun estos bela, alta, mia,
 simbolorplena peco poezia.

Mi diras jen: ministoj estas ni,
 mi diras jen,
 sed ofta estas abism-abomen',
 kiel sur turo sven' la kapon taŭzas,
 nin per abismoj fulgaj ŝaktoj naŭzas.

Profundas mino kun malpura ŝakt',
 profundas ĝi.
 malpuras ŝakto, kiel la pasi',
 en la mallumo varma trezorbrilon
 ni serĉas, ĝis ni trafas tombkovrilon.

Aŭ akvamaso iĝos tombkovril',
 aŭ akvamas',
 aŭ fulga fajro, aŭ venena gas',
 aŭ la glacio, aŭ ŝtoneg', aŭ tero,
 aŭ sufokmurda, surda min-aero.

Virin' kaj vir': egalas nia vest',
 virin' kaj vir':
 pri »kies« inter ni ne estas dir',
 ni nude vadas sub la varma tero,
 ĉu brila ŝton' ektintos sub la fero?

Ĉu brila ŝton' ektintos sub la fer',
 ĉu brila ŝton',
 diamanto, deca al reĝina kron',
 ĉu bona karbo, ĉu malbena oro,
 ni nur laboras plue sen konsolo.

VESPERA DEMANDO.

Se la vespero, ĉi karese flata
 Velurkovrilo nigra, mola, glata,
 Kiun dissternas vartistin' giganta,
 La teron ame estas surkovranta,
 Kaj tiel zorge, ke post la surmeto
 Plu staras rekte herbo kaj floreto,
 Ne iĝas sulko sur la florfolio,
 Kaj sur flugilo ĉielarke brila
 Ne perdas la glazuron papilio,
 Kaj tiel ili sub velur' kovrila
 Ripozas, sub ĉi glata kaj karesa,
 Ke ili tute sentas ĝin senpeza:
 Tiam, la vivo kien ajn vin gvidu,
 Aŭ hejme, en la bruna ĉambro sidu,
 Aŭ en kafejo gapu apud glaso
 Ekbrulon vican de l' sunluma gaso,
 Aŭ lace, kun la hund', sur mont' malgranda,
 Rigardu longe al la luno korna,
 Aŭ kun vi sur la polva vojo landa
 Veturu la koĉero duondorma,
 Aŭ sur balanca plank' de ŝipo mara
 Kapturmu, aŭ sur benko vagonara,
 Aŭ iru fremdan urbon kaj vagule,
 Langvore haltu ie, stratangule,
 Miri la longajn forajn stratliniojn,
 Kaj la duvicajn lumajn lampradiojn,
 Aŭ ĝuste en la akva urb', sur Rivo,
 Dum flamoj floras en opalspegul',
 Sopiru plore je l' pasinta vivo,
 Kies memoro estas dolĉa brul',
 Je l' temp pasinta, kiu, kvazaŭ sorĉa
 Lampet', jen brilas, kaj jen estas for,
 Kies memoro varma, dolĉmaldolĉa
 Estas samtempe ŝarĝo kaj trezor':
 Jen, tie via kapo pezmemora
 Kliniĝos lace al la ter' marmora,
 Kaj inter belo kaj plezuroj, drone,
 Tamen pri tio pensos vi poltrone:
 Por kio do ĉi belo kaj ĉi bril'?
 Tamen pri tio pensos vi, orfkora,
 Kial silk-akvo? kaj marmor' kolora?
 Kial vesper': flugila terkovril'?
 Kial montetoj? kial la branĉretoj?
 La maro kiun ne semadas hom'?

Kial la fluoj, refluoj sen finoj,
 La nuboj, ĉi malĝojaj Danaidinoj,
 La sun', ĉi brula Sizifosa ŝton'?
 Kial memoroj, printempoj, aŭtunoj?
 Kial la lampoj, kaj kial la lunoj,
 Kial la nefinebla Temp-lini'?
 Aŭ, jen ekzemplo de la herb' malforta:
 Kial ĝi kreskas, se ĝi velkos morta,
 Kial ĝi velkas, se rekreskos ĝi?

NOVA JARO.

1918.

Muzik' apokalipsa furiozas
 tra miaj nervoj, akuŝlit' Babela
 estas la mond', en sanga suk' ĝi tremas
 kaj grincas — ve — do kiu la turmenta
 turmenta akuŝant'? Ĝi estas mi,
 kaj vi, kaj ni, jam unuiĝis ĉiu
 en ĉi turment-apokalipso, en
 ĉi konvulsi' de sanga lit'. Ni kuras,
 baraktas, kiel ratoj sub piedoj
 gigantaj, ve! falĉiloj sangaj kaj
 sensangaj fulmas en kadavrodora
 aer' kaj gorge spiras nin la pest',
 el ostpalacoj sonas fremdmuziko,
 tempesto-paradizo senpordiĝas.
 Kion vi diras, ter', ĉielo? Kion
 vi trenas en terurajn novajn jarojn,
 ĉiel'? La ter' silentas, froste cirklas
 en sia nigra vintro, sed — ĝi foje
 vekigos, kaj ĝi kion diros per
 printempo sia bela, kion per
 arbaroj detruitaj, kion per

la vivaj fortoj, per mil parolriĉaj
okuloj de kampfloroj ĝermaj sur
stoplejoj teruregaj — Homo, Homo,
diboĉa, misa hazardul', el nokta
kartludo kampe sobriĝinte, kiel
rigardos vi en sovaĝflor-okulojn?

FORTISSIMO.

Koleras Dio, furiozas,
aŭ li nur dormas supre mute,
ĉu dormas, aŭ jam mortis tute —
he, homoj, kiu vekos lin?
Patrinoj ploru do pli laŭte,
kiun kanonoj ne alarmas,
ĉu vekus tiun plor' malforta?
kaj ne per larmoj ploru jam,
nur teren falas larmo-flu',
per voĉoj ploru al ĉiel',
ploru kun senindulga bru':
ne tiel dolĉe, kiel fonto,
kaj ne muzike, kiel pluv,
ne kiel iam Niobe':
senborde, kiel la inundo,
ploregu, kiel la rulbrua
lavang', ploregu nun glacian,
ploregu fajron, kiel lafo.
La karaj filoj falas for
en sang' sur neĝon, hor' post hor'.
Nenion lasu dormi nun
mutantan, misan, malkuraĝan,
ĉu estas inde timi plu?
ĉu estas inde vivi plu?
Kial silentas via gorĝo?
Ho, iru plori al la placoj,
krietu en preĝej'! Virinoj
de sovaĝuloj, vin sovaĝaj
preĝu en preĝo freneziga,
freneza!

Kaj, se vanaj estas
 preĝo kaj ploro, ni ankoraŭ
 blasfemi scias, viroj! Nun
 ni kredas jam je blasfeminda
 dormanta Sortpotenc' en Alto.
 Al lia dorm' ni jetu brue
 frapantan hajlon de blasfemoj!
 Se li mankas, kial estas li?
 Se li estas, kial mankas li?
 Lin neu, eble li vekigos!
 Ni ŝiru, batu lin per vortoj,
 kiel dommastron kiu dormas
 en brula dom' — la surdan Dion.

Ho! Surda! Surda!

Kiel bone
 nun esti surda, kiel Dio!
 Surdas la Ter', ne sentas dorse
 l' arme-plandbruon humiligan.
 Ho, bone estus surde ĝermi
 kiel florbulbo sub la ter:
 en ter', en Dio surdas ĉio,
 nur homo elsiriĝis el
 la surda Dio, por teruroj,
 li elkoviĝis verme, esti
 la verm' de Dio, por jukanta
 svarmad', dolori, ĉar — ja ĉio,
 krom surda Di', estas doloro,
 ĝis remortiĝos ĝi en Dion.

STRATO ANTAŬTAGMEZE.

Estis milito. Nun brakumo
 necesas: miks' de korp' al korpo,
 ke oni havu kiujn murdi,
 nek viv', nek morto malpliigu.
 Kiom da nudo kaj incitoj!
 Kuradas sur la strat' infanoj,
 ĉiam pli, kvazaŭ etaj ratoj,
 ĉiam pli multaj, pli ĉifonaj.
 Ili kelkfoje tiel mire
 rigardas, kvazaŭ demandante:

Kion vi volas pri ni? Kia
hered' atendas nin ĉi-tere?
Banknotojn niajn kiu ŝiris?
Kiu detruis niajn domojn?
Ĝardenojn kiu piedpremis?
Ĉu permesate fari tion?
Jen, eĉ la Teron ni ne venkis:
Ĝi skuas ŝarĝon en Tokio,
multegaj manoj de malsaĝaj
diaĵoj plenas ja de sagoj.
En la klinikoj hurlas febroj,
ĉi sovaĝbestoj kunpelitaj,
kaj la liberaj — en arbaro
de domoj aŭdas la vokhurlon.
Eĉ pan' ne estas dividita,
la fratoj divid-atendante
ja malsatmortas. La sekretoj,
ĉi tiuj vampirmonahinoj,
danĝeraj virgaj potencaĵoj
rikane sidas kaj insidas
kun nesolvitaj zono-nodoj.
Angore kaj senlume kuŝas
en ŝton' statuoj kaj metaloj,
sin kaŝas kantoj en aero,
kaj steloj en ĉielo fora,
kiom! kiujn ni eĉ ne vidis,
Okuloj viaj petas stelon,
kaj ja plej bonus jam kaŝiĝi,
kiel ŝuldant' malbona, sub-
nigraj jupoj de l' Fat-virino;
sed ve, ankoraŭ vipas Vivo,
kiun servadas eĉ la Mort',
disŝutas brulon stratoj brilaj,
kruroj kaj brustoj, kaj printempas...

STRATO VESPERIGE.

Jam vesperiĝas; la placojn aŭtoj
 sagfluge traboras per flamo en lakte
 griza aero; fiakristo traflosas,
 etendas vipon kvazaŭ maston; fajrovundoj
 ekbrulas, kiel skafandrolampoj sub akvo;
 virinetoj pretersusuras, etaj fiŝetoj, per flirto
 rapideme, kvazaŭ eĉ ne piede irante.
 Ĉi vesperoj estas la vesperoj de l' memoro. Per laca
 tintado, kvazaŭ ŝafidetoj, aŭ malfruaj
 tramveturiloj, ili vokas kaj tiras la longan
 trenajon kaj gregon de foraj vesperoj. Kiu vidis sur
Pécs-a strato la etan Miĉjon Babits, sur la krepuska
Pécs-a strato, kun la granda desegnotabulo, post la kvina,
 ĉar estis ankaŭ kanto-horo? Kompatinda, eta knab',
 — plej eta en la klaso — kapture iris hejmen nun,
 lace kaj ekscitite; rigardis la bastonon
 de l' lamp-ekbruligisto, en oreloj kun
 fragmentoj de l' kanthoro: »Estas nokte,
 malfruhore — Paŝtistfajroj brulas fore.« — Ho,
 vi kantĉifonoj, kiuj, kvazaŭ vesperaj skaraboj, zume kaj
 murmure batiĝas al la muroj de l' animo! Kiom da
 vesperoj kaj skaraboj! Ekde la latinaj papilioj
 de *Tibullus*, kiuj en miaj amaj
Bácska-vesperoj svenis en la odoro
 de la giganta rozĝarden', ĝis mil
 misteraj, superstiĉaj zumoj de militaj
 vesperoj, kiam al karegaj vivoj
 alarmis morto de sur afiŝoj — ĉu vi memoras?
 Ho, kiom da vesperoj, vesperskaraboj! Kaj nia animo
 jam estas kvazaŭ delonge ne purigita arklampo sur brua
 bulvardo de jaroj; ĉirkaŭ ĝi en dratreto
 restoj malpuraj de mil mortaj muŝoj kaj putraj
 papilioj nebulas kaj obstaklas la lumon.
 Foje ni devus jam ĵeti ĉiom en fajron!
 Forpreni la dratreton kaj libere kaj pure
 disŝuti nian lumon
 al novaj papilioj de novaj vesperoj!

DELONGE FORSONORIS TEMP' DE SAPPHO.

Liriko mortas. Per tro kruda man'
 ni ŝiris violonkorpon de l' knabin'
 sentema, trude, ĝis sovaĝsovaĝaj
 eksonoj, ke ŝi povas jam nur ĝemi,
 stertori, kiel la mortant'... Nek ritmo
 en ŝia ve', nek vort' plu, nek artikoj:
 komprena mens', muzika kor' ne sonas,
 nur pulmo jam spiregas, nur la gorg'
 kriegas, svene sonĝas la stomak'.
 Lirik' formortas, mutas ĉi epok'.

Anim', al kiu kanti? Oni diras:
 de miloj ĝemon ĝemu, jen ni: fratoj,
 kiom valoras vort', se nur la *via*?
 Dio! ĉu frat' do estas, kiu plendon
 de l' frat' ne aŭdas, se ĝi ankaŭ *lia*
 ne estas? Mond' memama! nur
 komunaj febro kaj mizer', komuna
 konfuz' balbutas, krome — surda mut'.
 Liriko mortas kaj la amo estas
 senvoĉa, kiel kiso de kolomboj.

Ho kara! sonas por ni mem la kant'.
 Delonge forsonoris temp' de Sappho.
 Ho kisu, mortas la Lirik', rifuĝas
 la trista vivo al silent' duopa.
 La homo iam homis, lia kor'
 trinkis la homon, frata kor'; nun — grego
 ĉagrenon tedan remaĉanta. Estu
 insul', el marĉ' atendu sunon! Larvoj
 ja naskas papilion. Kiu scias?
 La dioj mortas kaj la homo vivas.

EN ARBARA LOĜEJO.

La sun' malfrua al la ruĝa brikŝtupar'
 makulojn flavajn ĵetas. Restu! Restu do!
 Jen, vi tuttage havis min. Kaj vokas jam
 ĉi ruĝaj ŝtupoj al karcerio nokta min,
 al ĉambro, kie dum la tuta, tuta jar'
 mi vivas, tiel, ke mi abomenas jam
 min kaŝi en ĝi, eĉ se por la nura nokt'.
 Ne por vivul' ĝi estas! Kia sinforĝes'
 terura, kia frenezum', malsana tir'
 devigis do popolon vian, sankta reĝ',
 karceron fari por si kaj sin kaŝi de
 prapompo via en kavernoj? Malbenit':
 kiu unue metis domon sen bezon'
 sur domon, ke etaĝo estu; kiu per
 la muro muron ŝirmis, ĝis el la beton'
 kaj oro kaj literoj jen, ĉi labirint'
 plektiĝis, kiu nun sufokas nin, ke vin,
 ho nia patro, reĝ', trezor', eterna rajt',
 per mon' aĉetu, kiu foje, kiel mi,
 jam dronis en ĉi ŝton-fukaj'; por ke ni pli
 naniĝu ol besteto, ĉar libere ĝi
 rigardas kontraŭ la Senfin'. Ho mi, jes, mi
 elsaltos foje, kaj malvestos nuda min
 kiel la sovaĝul'; mi ĉion ŝiros for,
 mi ĉion puŝos for: betonon, oron kaj
 literojn, kiel maron puŝas la remist'
 por veni rodon. Mi per ekscitita brak'
 sub viajn bordojn kaj vizagon puŝos min,
 pelate, kun ŝirita, sanga, vea korp',
 senveste, kaj sovaĝe, kvazaŭ kampa lup',
 ke via flamo-, hajlo-, ŝtono-, dorno-vip'
 la nudan korpon frapu, batu morta ĝin!

CIGANO EN MORTKONDAMNA ĈELO.

Tiel naskiĝis iam la vers' sub fingro mia,
kiel skarab' flugila, kirasa, bril-artika
kreiĝis eble per la mano Dia.

Tiel naskiĝis poste ĝi sur mia lip',
kiel la trumpetkrio, la trumpetkrio
sur lipo de soldatoj, krusta pro la soif'.

Sed nun jam venas mallaŭte, disflue kaj timeme,
kiel en kavoj de okuloj ombroringaj
ekbrilas la larmo treme.

Ne por mi mem mi ploras: jen, frataro miliona,
plejparte tiel mizera, ah, mizera,
eĉ el song' ili ne konas, kio bona.

Kabanon ili ĉarpentus arbare, sed lignoj — tabuo!
ili ĝojas, se urbe, en granda dom' skatola,
ili havas malluman skatolon je luo.

Kaj ĝojas — se ĉio rompiĝis, ne eblas plu toler' —
ke eblas jen, transpaŝi kortbalkonan kradon,
altiras ĉiun la Patrin', la Ter'.

Malĝoja mond'! terurite muzikas vers-sonor',
kiel cigan' en mortkondamna ĉelo.
Huŝ. brilaj, flugbataj, zumantaj skaraboj, huŝ for!

Se ĝi ne povas vekti mortintojn, kial la trumpetkrio?
Nur la larmo, la larmo, la larmo falas,
sen demando: ĉu utile por io?